

Numero: 281.
Oktobro: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Ni hungaroj forgesas nian gepatran lingvon

-dua parto-

La hungara lingvo multe ŝanĝiĝis en la lastaj jardekoj. Ĉiutage novaj kaj novaj vortoj enŝteliĝas en nian cerbon. Ĉefe anglodevenaj vortoj disvastiĝas en la mondo infektante la lokajn lingvojn.

Ĝis nun nia gepatra lingvo ankoraŭ transvivis tiajn atakojn, sed estas konate dum jarcentoj multaj naciaj lingvoj malaperis aŭ ili fariĝis duagrandaj en la ĉiutaga uzado.

Laŭ mi la gejunuloj estas celitaj, ĉar ili ankoraŭ ne sentis kiom da danĝero kaŝiĝas en tiu ĉi fenomeno. Ili estas impresiĝemaj por akcepti plaĉajn vortojn, esprimojn. Al ili plaĉas la fanfarado per nova lingvo.

Kompreneble tio ĉi ne estas malbona. La gejunuloj ĉiam deziras fariĝi aliaj ol la pli aĝa generacio.

La disvastiĝo de la komputiko donis al ni multegajn novajn vortojn. Ili ne restis nur en la kadro de komputiko, sed multaj vortoj transiris en nia lingvouzo.

Mi timas la hungaran lingvon. Ĝi estas sufiĉe forta, sed mi ne scias, kiom longe ĝi povos kontraŭstari tiujn ĉi influojn kaj ĉiufoje ĝi renoviĝos.

Estus bone, se tiel ĝi okazus.

Esperantistoj estas kontraŭ neniuj lingvoj. Ofte nin oni atakas, ke Esperanto deziras superi ĉiun nacian lingvon kaj fariĝi la unusola pontolingvo inter diverslingvaj homoj.

Mi tiel vidas Esperanton, ke ĝi povus servi kiel helplingvo. Paralele kun ĝi la homaro povus kontakti ankaŭ per aliaj lingvoj.

Grave, ke neniuj nacia lingvoj fariĝu ekstra, kiu minacas aliajn.

Estus bone, se ni hungaroj ne forgesus nian gepatran lingvon, eĉ ĝi plu prosperus.

Ĉiu nacia lingvo klopodu konservi siajn valorojn ankoraŭ longtempe!

-Redaktanto-



Mia papago lernas Esperanton

Antaŭ nelonge mi aĉetis belan, koloran papagon. Baldaŭe ĝi fariĝis la favorato de la familio. Ĝi havis flavan, verdan kaj ruĝan plumaron. Laŭ mi neniuj posedis tian belegan papagon en la ĉirkaŭaĵo. Mi estis tre fiera je mia kara birdeto.

Dum la tuta tago ĝi estis en sia komforta kaĝo, kie estis sufiĉe da nutraĵo, diversaj ludiloj, speguleto en kiu ĝi povis rigardi sin.

Mi donis nomon Roberto al ĝi. Post kelktaga ripetado laŭ mi ĝi komprenis sian nomon. Kiam mi vokis ĝin Roberto, gaje komencis pepadi.

Ĉiutage mi instruis ĝin pri hungaraj vortoj kaj mallongaj frazetoj. Onidire papago povas ellerni la homan parolon, se la posedanto diligente instruas ĝin pri tio. Mi havis konatulon, kies papago tute bone povis paroli. Ĝi bele ripetadis: Mi estas Ŝteĉjo. Mi estas bela. Ŝteĉjo ŝatas militon k.t.p.

Ankaŭ mi deziris instrui mian papagon paroli. Kiom bonege estos, kiam mi alvenos hejmen ĝi salutos min: Bonan tagon, sinjoro! Almenaŭ iu ĝojegos, se mi hejmeniĝos.

Mi pensis, tio estos facila laboro. Tage aŭ vespere ni ekzercos la hungarajn vortojn kaj fine mia papago ellernos ilin.

Konate, ke mi instruas Esperanton al gejunuloj. La kaĝo estas en tiu ĉambro, kie okazas la lernohoroj.

Kial mi skribis tion ĉi? – Certe vi estas scivola. Tuj mi klarigas ĉion. Vane mi ekzercigis la hungarajn vortojn, mallongajn frazojn al mia „saĝa” birdeto, ĝi ne volis ekparoli. Ĝi nur mute rigardis min, kiel mi parolas. Eble ĝi ridetis pri mi kaj diris: Ankaŭ tiu ĉi homo stultiĝis.

Pasis multe da tagoj, eĉ semajnoj, mia papago sciis diri nenion en hungara lingvo. Mi estis tre tre malĝoja. Mia amiko proponis, ke mi montru ĝin al iu fakulo! Eble li povos helpi aŭ li havas ian bonan manieron.

Mi jam komencis rezigni, ke mia papago neniam ekparolos, kiam dum iu Esperanto lingvohoro, okazis tia afero pri kio mi neniam estus kuraĝinta pensi.

Ni lernis la gramatikon, legis, skribis diversajn ekzercojn. Do daŭris la lernohoro, kiam neatendite ĝi laŭte ekparolis: „ Esperanto estas internacia lingvo.”

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XVI-a



Vespere ili pli ne parolis pri Elizabeta, eĉ Johano ne deziris paroli ankaŭ siaj suferoj en tiu damnita mondo, kie li estis.

Ili kune vespermanĝis kaj poste aŭskultis la muzikon de iu moderna komponisto, kies melodioj estas disvastiĝintaj tra la tuta sunsistemo. Onidire oni volonte aŭskultas ilin ankaŭ en foraj galaksioj. En la lastaj jardekoj realiĝis la kulturaj kunlaboroj inter diversaj sunsistemoj kaj planedoj.

Tute interesaj artaĵoj venis de tiuj malproksimaj civilizacioj. La plej fantasta interŝanĝo okazis kun la sesaj dimensianoj. Ilia muziko transformas la homan cerbon kaj la aŭskultantojn ĉi tiu muziko flugigas al neimagebla mondo kaj de tie reveni estas ege malfacila. Pro tio la Centra Kultura Komitato malpermesis ĝian aŭskultadon. Ĝi funkciis, kiel narkoto. Kompreneble multaj kaŝe aŭskultis tiun ĉi muzikon en dum sekretaj seancoj. Onidire pri tiuj la lunpolico sciigas, tiuj estas ekzilitaj al la diversaj mino de la planedo Pluto, kie ili devas punlabori ĝismorte. Tio ĉi estas tre kruela punego. Tamen malgraŭ tio en ĉiu jaro multaj homoj kredas, ke ili sukcesos kaj ili travivos eksterordinaran minutojn dum la aŭskultado de tiu ĉi muziko riskante la punlaboron.



Post la multaj admirindaj melodioj la onklino Elizabeta prenis la teleregilon kaj komencis premadi ĝiajn butonojn. Kiam la sekreta kodnumero estis registrita, neatendite eksonis tiu ĉi malpermesita muziko.

Johano ne povis protesti, tiom fulmrapide okazis la tuta afero.

Apenaŭ pasis kelke da taktoj de la muziko Johano sentis strangan bruojn en sia cerbo. La lumoj de la ĉambro estingiĝis. Unue ĉio iĝis griza kaj dolorige ĉiakolora. Li ne rememoris plu. Kiam Johano

malfermis la okulojn, li promenis sur vasta kampo kun la onklino, sed ŝi estis juna kaj franda.

Johano sciis, kiu ŝi estas. Li deziris liberiĝi de tiu ĉi halucino kaj laŭte ripetadis: „Tio ĉi estas nur sonĝo. Tio ĉi estas nur sonĝo. Mi ne volas enamiĝi al mia onklino.”

La onklino Izabela ĉarme ridetis, kvazaŭ ŝi instigus lin pri amorado. Li volis protesti, sed kiel la tempo pasis, li sentis, ke la forto de lia korpo forlasas. Li ne estas kapabla direkti siajn sentojn. Ne eblas, ke li amoradu kun sia amata onklino. Li amegas Elinjon. Morgaŭ li renkontiĝos kun ŝi. Kiel li klarigu al ŝi, ke nokte li kune dormis kun oldulino. Elinjo tuj interrompus la kontakton kaj eble ili ne vidus ŝin plurfoje.

La allogo estis granda. Izabela fariĝis pli bela kaj pli franda de tempo al tempo.



Ili alvenis la bordon de lago. La vetero estis agrabla. La animagordo kaj la beleco de la pejzaĝo vekis en ili la emon por baniĝi en la varmetaj ondoj.

Ili senparole kvazaŭ ili estus pensitaj same komencis forĵetadi siajn vestaĵojn. Baldaŭe ili ambaŭ staris sur la lagobordo nude kaj ili ekiris en la akvon.

Komence ili nur naĝadis kaj ili ĝuis la baniĝon. Krom ili neniu estis en la proksimo. Ili estis nur duope.

Kiam jam ili baniĝis sufiĉe, je la propono de Izabela ili iris al la sableca bordo por sunumi. Ili kuŝiĝis sur la veluran sablon kaj ili mute rigardis la ĉielon. Super ili birdoj flugis ien bruante.

Johano volis nombri la birdojn.

-Unu... du... tri... kvar... li diris laŭte, kiam neatendite Izabela ekprenis lian manon kaj ŝia buŝo proksimiĝis al la lia.

-daŭrigota-



Poezio

-Ĉu vi legas versojn? – Mi aŭdis sur la strato el la buŝo de iu viro.

-Ne - venis baldaŭ la respondo. – Min ne interesas la poezio. Lastfoje mi legis ĝin, kiam ĝi estis devigita en la lernejo. Ankaŭ tiam ĝi ne interesis min. Mi legas nek versojn, nek romanojn. Mi prefere rigardas televidoprogramojn. Mi havas almenaŭ cent televidokanalojn. Stulta homo, kiu nun legas. Ĉu ne?

-Jes, amiko. Tia homo estas tre stulta.

Ili iris plu kaj komencis babiladi pri alia temo.



John S. Dinwoodie

La virtuozo

Trankvilmiena, digne serioza,
sen aflektemo, tute sen parado,
la grizehara majstro virtuoz
aperis antaŭ ni sur la estrado.

Li staris antaŭ siaj aŭskultontoj,
kvazaŭ ne muzikisto sed profeto
el la pratempo, el silentaj montoj
veninta urben kun vivinterpreteto.

Per tuŝo firma tamen delikata
la pretajn kordojn li karese premis,
kaj, eltirite per la arĉo flata,
en la aeron riĉaj tonoj tremis.

Dum li la melodion glate plektis,
sur malproksimo restis la okuloj,
kaj en la muzik-riĉo sin reflektis
la nekonata mond' de l' viziuloj.

Facila ŝajnis tiu sonkompilo,
senpene elvokita, efemera,
miksaĵo el pasio kaj trankvilo,
la glora celo de la arto vera;

la glora celo ankaŭ de l' vivdramo –
ne fajr' saltanta en dancado febra,
sed daŭra, brila kaj sentrema flamo,
plena de la trankvilo nedirebla.

Li estis ne nur virtuoza' talenta
kun paradota ludlerteco,
ĉar ŝajne estis li indiferenta
al homdonataj laŭdo kaj apreco.

Li staris kun aspekto sacerdota,
celante ĉe l' Plejalto aŭdiencon,

la celebrant' de tiu rit' ekzota,
teren vokanta la ĉielpotencon.

Kaj pro subtila sento, ke ni venis
samcele kiel li mem, samspirite,
por ni kunadorantoj li solenis
la grandan sanktan feston muzikrite.

Li estis pastro benon disdonanta
de iu sakramento efektiva,
komunikanto de donaco sankta,
kanalo homa de la graco viva.



William Auld

Al mia amatino neesperantista

Eklerni esperanton vi evitas:
tre bone, kara, scias mi la kaŭzon
de tio, ke vi kvazaŭ sentas naŭzon,
kiam mi ion esperantan citas.

Ho jes! Ĉu kredas vi, ke mi ne vidas
tiun subitan spasman spiropaŭzon?
Pri l' lingvo sentas vi ĵaluzotaŭzon,
ke mian amon vi kun ĝi dividas!

Kara, pripensu: ĉu ne bone estus
se pri la aferet' vi ne kontestus,
sed entreprenus Zamenhof-ekzercojn?

Ĉar tiam vere vivus vi pli home,
kaj sentus kun, ne kontraŭ mi – kaj krome,
vi poste povus legi miajn versojn.



Por infanoj

Karoto revenas (ĉina fabelo)



En la valo tre neĝis kaj en la montoj estis granda neĝo. Elĉerpiĝis la nutraĵo de la leporeto. Ĝi ekiris por serĉi ion.

Neatendite ĝi ekkriis:

-Ho! Mi trovis du karotojn!

Ĝi manĝis unu karoton. Restis ankoraŭ unu. Pensis la leporeto. Estas granda neĝo kaj la vetero estas tre malvarma. La azenido estas hejme. Certe ĝi ne havas kion manĝi. Mi portos por ĝi la karoton por ke ĝi ne malsatu!



La leporeto kuris al la azenido, sed ĝi ne estis hejme. Ĝi metis la karoton antaŭ la pordon. La leporido ne estis hejme pro tio, ĉar ankaŭ ĝi serĉis nutraĵon. Ĝi trovis dolĉan terpomon, kion ĝi hejmenportis feliĉe. Ĉe sia domopordo ĝi ekvidis la karoton. La azenido tre ekmiris.



-Kiu portis ĝin al mi?

La azenido manĝis la dolĉan terpomon. Estas granda neĝo kaj la vetero estas tre malvarma. La ŝafido estas hejme. Certe ĝi ne havas kion manĝi. Mi portos por ĝi la karoton por ke ĝi ne malsatu!



La azeneto kuris al la ŝafeto, sed ĝi ne estis hejme. Ĝi metis la karoton antaŭ la pordon. La ŝafeto ne estis hejme pro tio, ĉar ankaŭ ĝi serĉis nutraĵon. Ĝi trovis brasikon, kion ĝi hejmenportis feliĉe. Ĉe sia

domopordo ĝi ekvidis la karoton. La ŝafeto tre ekmiris:

-Kiu portis ĝin al mi?

La ŝafeto manĝis la brasikon. Estas granda neĝo kaj la vetero estas tre malvarma. La kapreoleto estas hejme. Certe ĝi ne havas, kion manĝi. Mi portos por ĝi la karoton por ke ĝi ne malsatu!



La ŝafeto kuris al la kapreoleto, sed ĝi ne estis hejme. Ĝi metis la karoton antaŭ la pordon. La kapreoleto ne estis hejme pro tio, ĉar ankaŭ ĝi serĉis nutraĵon. Ĝi trovis tigobrasikon, kion ĝi hejmenportis feliĉe. Ĉe sia domopordo ĝi ekvidis la karoton. La kapreoleto tre ekmiris:

-Kiu portis ĝin al mi?

La kapreoleto manĝis la tigobrasikon. Estas granda neĝo kaj la vetero estas tre malvarma. La leporeto estas hejme. Certe ĝi ne havas, kion manĝi. Mi portos por ĝi la karoton por ke ĝi ne malsatu!



La kapreoleto kuris al la leporeto, kiu jam satiĝis kaj dormis, kiel bebo. La kapreoleto ne volis vekigi ĝin. La karoto estis lasita en la domo apud la lito. Vekiĝante la leporeto ne kredis al siaj okuloj.

-Okazis miraklo. Revenis la karoto. Interese. – La leporeto komencis cerbumadi iomete, sed ĝi rapide divenis. La karoton ĝiaj geamikoj portis donace por ĝi.

(Tradukis el hungara teksto: Apáti Kovács Béla)



Humoraj bildoj

Humoraj bildoj

